



# ELNA-BULTENO

## ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 19 (73)

Aprilo 1973

Novaĵa Redaktoro: Erik J. Felker  
(demisionta post ĉi tiu numero)

Literatura Redaktoro: Charles R. L. Power  
1014 Weymouth Avenue, San Pedro, CA 90732

### novaĵoj el Usono

#### Kalifornia Esperanto-Konferenco

Kaliforniaj geesperantistoj ĝuis semajnfinan konferencon, 73.04.13-15, en Santa Barbara, Kalifornio. La ĉefa temo de la konferenco estis novaj instru-materialoj pri Esp-o.

Doris Vallon klare montris la ĉefan ideon de la kunveno, dirante ke Esp-o povas pliriĉigi la vivon de iu ajn studanto, kaj ke la instruanto, ĉu profesia ĉu ne, devus laŭeble disponigi al la lernantoj tiun saman nivelon de kompetento kiun ili trovas en klaso pri nacia lingvo.

Sekvis prezentado de pluraj kursoj, libraj kaj diskaj. Se vi intencas instrui nian lingvon, nepre kontaktu s-inon Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara, CA 93111, por ricevi informojn pri lernolibroj, sonbendoj, diskoj ktp.

Alia pridiskutita afero nepre pripensenda por ni ĉiuj estis, ke ges-roj William kaj Cathy Schulze decidis ĉesigi sian longdaŭran kaj tutkoran laboron kiel informcentro kaj libroservo. La kialo de tiu decido estas, ke de post kiam la okcidenta informcentro fariĝis la sola funkcianta, la laboro multe kreskas, des pli pro tio, ke la informpetoj daŭre plimultiĝas.

Oni ĝenerale decidis, ke la sola taŭga respondo al la problemo estus

starigi veran oficejon (ges-roj Schulze sindoneme uzis sian propran domon). Oni ankaŭ antaŭvidis la bezonon por dungitaj profesiuloj.

Tio kompreneble signifas, ke ELNA bezonos grandan kvanton da mono, kaj de la movado mem kaj de ekster la movado. Stariĝis pluraj komitatoj por komenci la necesan laboron, inter ili grupo por konkretigi planojn kaj grupo por prezenti la planojn al fondusoj kaj peti finanĉan subtenon.

Jen vere grava eblo antaŭenigi la usonan movadon. Via helpo per ideoj kaj laboro estos tre bonvena kaj estas eĉ urĝe bezonata. Skribu al la redakcio por ke ĝi transdonu vian leteron al la koncerna komitato. Antaŭdankon!

#### Kongresoj, konferencoj kaj konsternatoj

La pasintjara ELNA-Kongreso havis apartan etoson pro tio, ke ĝi okazis meze de la Universala Kongreso. Ĝi estis samtempe tre oportuna kunveno, ĉar se oni jam vizitis la UK-on, oni ne bezonis elspezi pli da mono por viziti la ELNA-Kongreson.

Kompreneble, tio estis ja raraĵo, kaj fakte, vojaĝi de unu parto de Usono al alia por ĉeesti tri-tagan ELNA-Kongreson povus ŝajni multekosta afero rilate al la rezultato.

Do en ELNA oni penas fari decidon pri la taŭgeco de naciskalaj kongresoj kiel parto de la usona

movado. Pro la graveco de la afero, ni petas ke vi esprimu vian opinionon al la estraro, por helpi ĝin decidi pri la venontaj jaroj.

Vi trovas ĉi-apude oportunan opini-indikilon per kiu vi informu la estraron pri viaj deziroj. Nepre indiku vian elekton kaj faru komentojn laŭdeziro aŭ indiku alian planon. Tiam fortranĉu la indikilon kaj sendu ĝin al la redakcio, kiu tabeligos viajn opiniojn kaj ilin prezentos al la estraro.

ELNA apartenas al vi! Esprimu viajn opiniojn pri ĝi!

(Se vi ne volas difekti la Bultenon, poŝtkarto kun pernumera indiko de via(j) elekto(j) sufiĉos. Komentojn kaj sugestojn metu sur aparta folio.)

#####

NOVAĴOJ PRI EKCO (Esperanto-Klubo de Centra Ohio) de Jane Wills

Je la fino de marto aperis artikolo pri Esp-o de Deland Kittel en Sunday Dispatch Magazine de Columbus. Tiu revuo estas vaste legata en la ŝtato.

En Circleville, loka E-klaso ricevis gazetan diskonigon, kaj s-ro Lew Cook aperigis faldfolion pri tiu urbo.

Murray Merner, studento duajara ĉe Ohio State University, prelegis pri Esp-o al sia klaso pri komunikado kaj aranĝis ekspozicion de libroj en la biblioteko de la eduka fako de la universitato.

S-ino Wills, ĉe la kunveno de la Asocio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj en Ohio kunsidis kun la instrurajtiga komitato de la ŝtato. Du lokaj lernejsistemoj deziras enkonduki Esp-on, se eblos decidi pri la bezonataj kvalifikoj por la instruistoj kaj starigi kursojn por ili.

Se vi scias la kvalifikojn por instrui Esperanton en via stato, bv. tuj kontakti s-inon Wills, 94 West Riverglen Dr., Worthington, OH 43085.

\*\*\*\*\*

OPINI-INDIKILO

Estimata Estraro de ELNA:

Jen mi indikas mian opinionon pri la usona sistemo de kongresoj kaj konferencoj. (Oni eventuale rajtas indiki plurajn elektojn, fari komentojn kaj/aŭ sugesti alia(j)n eblo(j)n.)

1. Forigu la ELNA-kongresojn. Okazigu nur aferkunsidojn por la estraro.

2. Okazigu la ELNA-kongresojn ĉiam en la kadro de la tiujara Universala Kongreso, en kiu ajn lando tio troviĝas.

3. Okazigu ĉiujare aron da regionaj konferencoj. La estraro vizitu unu el ili ĉiujare por sia aferkunsido.

4. Alternigu tutlandajn ELNA-kongresojn kaj regionajn konferencojn.

5. Sekvu la nunan planon, t. e. okazigu ĉiujare tutlandan ELNA-kongreson.

EN LA BIBLIOTEKOJ

ESPO (Esperanto-Societo de Portland, Oregon) donacis esp-ajn librojn en valoro de cent dolaroj al universitataj kaj publikaj bibliotekoj.

Bonaj, modernaj libroj en bibliotekoj estas fortaj "amikoj" por ni. Alia ebleco, krom donaco de libroj, estas rekomendo al la ĉefbibliotekisto ke la biblioteko mem aĉetu la librojn. Oni do pridiskutu la gravecon de nia lingvo kun la ĉefbibliotekisto kaj eventuale rekomendu taŭgajn librojn.

Se vi ne havas ĝisdatan liston de libroj, skribu la Esperanto Book Service, P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010 (enmetu afrankitan koverton kun via adreso).

La Universitato de Washington donas kvin studkreditojn al ĉiu studento kiu instruas al si Esperanton. Imitinda (kaj monŝpara!) agado.

### Servo al la komunumo

Se iu persono bezonas tradukiston au interpretiston, al kiu li sin turnu? Se li bezonas tradukon inter du el la t. n. "grandaj" aŭ "gravaj" lingvoj, la problemo ne estas senesperiga, sed se persono en mezgranda urbo bezonas tradukon el la ĉina en la portugalan, ekzemple (kaj ili ambaŭ estas fakte gravaj lingvoj) --la situacio povas esti malfacila.

Havebligi al la publiko liston de tradukistoj kaj interpretistoj estus valora servo kiun lokaj Esperanto-klubo povus doni al la komunumo. Komprenoble, oni inkludus Esperanton en la listo, kaj ankaŭ la gestolingvon de la surduloj.

Oni devus serĉi inter etnaj preĝejoj kaj kluboj, universitatoj, lingvolernejoj kaj aliaj lokoj por starigi la liston, sed ĝi servus al personoj kun lingvaj problemoj, kaj tiuj estas ĝuste la personoj kiuj povus havi intereson lerni Esp-on. Komprenoble, kiam la listo estus preta, oni anoncus tion al la publiko kaj tiel kreus okazon por propagando.

### La Rotaria Klubo

de Monterey Park, Kalifornio, faris rezolucion pri Esperanto. La klubo agnoskas, ke Rotario bezonas lingvon internacian, kaj petas, ke tuta Rotario "instigu la studadon de Esperanto je ĉiuj edukniveloj kaj elpensu projektojn kaj gvidkonceptojn por atingi tiun celon."

### "Soleco

en mondo de tri miliardoj da homoj" estas la aprila temo de PHP, revuo internacia eldonata en Japanujo. Kiel parton de la prezentado de tiu temo, William H. Schulze verkis angle artikolon, "Ĉu la angla estas la plej bona lingvo por internacia komunikado?" (Kion li respondis oni povus verŝajne diveni el la fakto, ke s-ro Schulze estas direktoro de nia Esperanto-Informcentro....)

### Esp-glumarko de 1915

Conrad Fisher nun verkas rubrikon "Esperanto Seals" en Seal News, monata organo de Christmas and Charity Seals Society, laŭ peto de la eldonanto, kiu jam de longe serĉas la glumarkon de nia unua landa E-kongreso (1915), almenaŭ por havi bildon de ĝi en la usona katalogo. Ĉu vi havas ekzempleron, kiun vi bonvolus pruntesendi por ke li fotokopiu ĝin? Aŭ ĉu eble vi mem bonvolus fari fotokopion por li?

Se vi povas helpi, bonvolu kontakti s-ron Conrad Fisher, R. F. D. #1, Meadville, PA 16335.

### Aŭd-Vida Sekcio de ELNA

S-ro H. Ken Ver Ploeg memorigas al ni, ke 156 programoj sonbendaj estas prunte haveblaj al kaj unuopaj membroj kaj grupoj. Programo daŭras almenaŭ tridek minutojn, kaj estas disponebla kasete aŭ bobene. La 30-taga luprezto de ĉiu bendo estas nur \$1.00.

La temoj de la plimulto de la sonbendoj estas aŭ esperantaj aŭ mondkulturaj.

Pro tio, ke tute sonbenda kluboprogramo estus iom enuiga, oni sugestas ke la programo enhavu ne nur la sonbendan prezentadon, sed ankaŭ prezentadon de bildoj, dancoj aŭ aliaj vide interesaj aferoj.

Por ricevi kopion de la listo skribu al s-ro H. Ver Ploeg, 321 E. 19th Ave., Spokane, WA 99203.

(GRAVE: Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras. S-ro Ver Ploeg antaŭ iom da tempo perdis la adreson de iu mendinto de sonbendo, do ne povis sendi la menditaĵon. Tiu persono bonvolu tuj skribi al s-ro Ver Ploeg por meti la aferon en ordon. Antaŭdankon!)

Se vi volas kontribui programon al la kolekto, bv. interkonsiliĝi kun s-ro Ver Ploeg pri teĥnikaĵoj, taŭgeco ktp.

Propagandiloj

estas haveblaj de s-ro Adrian Hughes, 467 South Bailey Avenue, Hillsboro, OR 97123. Oni povas elekti inter "Be Ahead of Your Generation", "Basic Facts About Esperanto", "ABC's of Esperanto" kaj represaĵo de la bonega artikolo de Marjorie Boulton en Encyclopædia Britannica. Kontaktu s-ron Hughes pri kvantoj kaj prezoj.

Ĉu mondlingvo eblas?

En Spokane, Washington, la prezidanto de Whitworth College intervjuis s-ron H. Ken Ver Floeg pri la temo "Ĉu mondlingvo eblas?" ABC-televidelsendejo disaŭdigis la intervjuon en kvar eroj tra nordokcidenta Usono kaj parto de Kanado.

Fascinaj flustraĵoj

Ekzistas, verŝajne, iom da ebleco ke grupo de usonaj kaj japanaj geesperantistoj vizitos la Ĉinan Popolan Respublikon. Se la redakcio ricevos pli detalajn informojn, ĝi aperigos ilin.

*Ĉirkaŭ ni*

Virina liberiĝo

prezentas al ni interesplenan demandon. Ĉiuj jam sendube rimarkis, ke en la angla kreiĝis nova titolo "Ms.", kiu indikas ke la koncerna persono estas virino, sed ne malkaŝas ŝian geedzan staton. (Oni notu bone, ke la anglalingva titolo "Mr." same ne donas tiun informon.)


En Esperantujo, virinoj devas elekti inter "sinjorino" kaj "fraŭlino", kvankam ne necesas, ke viroj informu pri la geedza stato-- ili ĉiuj povas uzi la titolon "sinjoro". (Kvankam la vorto "fraŭlo" ja ekzistas, ĝi estas tute ne uzata kiel titolo, kaj el la vidpunkto de egaleco, ŝajnas principe



ke neniu estu devigita vole-nevole informi al alia pri geedza stato.)

Ne ŝajnas bona ideo, ke nomo estu tute sen seksindika titolo, precipe en internaciaj rilatoj, pro tio, ke nescio pri la sekso de iu persono povus kaŭzi embarasaĵojn!

Do, gelegantoj, kiel Esperanto povus respondi al tiu ĉi nova ideo? Kiel vi opinias pri (anstataŭ "sinjoro" kaj "sinjorino" aŭ "fraŭlino") Viro kaj Ino, Virpersono kaj Personino, Virhomo kaj Homino, aŭ la uzado de "viro" kaj "virino" antaŭ aŭ malantaŭ la nomo inter krampoj? Faru sugestojn!



Informo petata

Se vi scias kie estas la filmo "Angoroj", kiun prunteprenis J. H. Mahé al kluboj en Usono, bonvolu kontakti Richard Ranc, Dept. of Psychology, Southern Illinois University, Carbondale, IL 62901.



Korektendaĵo

Se vi volas senpage ricevi la broŝureton pri Bahaismo kiu antaŭ nelonge recenziĝis en ELNA-Bulteno, nepre petu ĝin nur de s-ino Roan Orloff Stone, 504 N. Fifth Street, Gallup, NM 87301.

Pli da "Praktiko" (de Ellen Lewis)

Ŝajnas al mi, ke la mondo sentas la mankon de La Praktiko. La rubriko "Komenco bona--ĉio bona" en revuo Esperanto estas helpema sed nesufiĉa. Ni tamen agnoskas, ke realece ne plu eblas al UEA eldoni La Praktiko-n. Mi do faras proponon, kiun la leganto eble trovos praktika. Mi proponas, ke ni mem eldonu "gazeton kiu instruas kaj amuzas."

Kompreneble, tiu revuo estus tre modesta. Kion ni bezonos? Redakcion --mi aŭ alia povus esti redaktoro, sed necesus redakcia adreso. Skribomaŝinon kun Esperantaj supersignoj, multobligilon, iu(j)n kun sufiĉe da tempo--kaj monon, sed fakte ne tre multe.

Kiuj estus la "ni" kiuj verkus la artikolojn ktp? Esperantistoj en kaj ekster Usono, ĉar ne temas pri ELNA-Bulteno. Se vi estas sperta Esperantisto, antaŭ ĉio se vi instruas la lingvon aŭ verkas en ĝi, mi invitas vin verki artikoleon.

Ĝi estu mallonga, verŝajne nur unu tajpita paĝo. Kaj memoru, ke la celo estas helpi komencantojn kaj aliajn. Antaŭnelonge en mia kurso pri la hebrea lingvo ni ricevis la jenan hejmtaskon: elektu verbon el la koncerna konjugacio kaj verku dialogon aŭ historieton en kiu la verbo uziĝu en kiel eble plej multe da formoj de la jam studitaj tempoj. Do ja eblas "instrui kaj amuzi"!

Mi invitos miajn pli spertajn korespondantojn fari same. Ĉiu povus fari similan proponon al siaj korespondantoj. Oni povus ankaŭ adapti materialon el loka gazeto aŭ bulteno. La enhavo estu neŭtrala laŭ la statuto de UEA. La kontribuaĵoj estu de ĝenerala intereso. Ili ne devus esti pri Esperanto, sed ili devus esti en bonstila, korekta Esperanto. Ĉar la artikoloj devus esti, almenaŭ en la komenco, mallongaj, mi sugestas, ke oni ekzemple ne priskribu tutan

(daŭrigo sur p. 6)-----\*

-----reklamo-----

# EL POPOLA ĈINIO

Esperanta Monata Ilustrita

Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro \$2.20  
2 jaroj \$3.30  
3 jaroj \$4.40

ABONU: ĉe Esperanto Book Service  
P. O. Box 508  
Burlingame, CA 94010



vojaĝon, sed elektu unu aparte interesan aspekton de ĝi. Mi proponas, almenaŭ provizore, mian adreson. Kiam mi havos sufiĉe da kontribuaĵoj, ni povos plani la unuan numeron de--kio estu la titolo? Ni ne maltrankviliĝu; iu havos taŭgan ideon pri titolo. Komence ĝi verŝajne aperos neregule, kaj eble sen reklamoj aŭ anoncetoj. La abonprezo estu tre malgranda, kaj tio certe eblas. Ĉar mi ne scios, kiam specifa artikolo aperos, mi sugestas, ke oni ne skribu novaĵojn se oni volas, ke ili estu aktualaj. Kaj oni memoru, ke la gazeto celas esti tutmonda. Nun ne estas limdato, sed kiam vi havos tempon, bonvolu verki ion kaj sendi ĝin al mi. Ne forgesu la interlinian spacon kaj la larĝajn margenojn!

F-ino Ellen Lewis  
15 Salisbury Road  
Brookline, MA 02146

### Bulgara turismo

Se por libertempa aŭ komerca vojaĝo vi vizitos Bulgarion, nepre petu antaŭe ke vi ricevu la turisman bultenon (esperantlingvan) "Bulgario-Turisma Informo". Ĝi donas konstante ĝisdatigatajn informojn pri tiu lando. Petu la bultenon ĉe Monda Turismo, P. K. 45, Sofia, Bulgario.

### ...kaj Monda Turismo

Monda Turismo, internacia, esperantlingva turisma grupo, nun kunmetas liston de turismaj lokoj tra la mondo (ekz. hoteloj, flughavenoj, restoracioj, vojaĝagentejoj, butikoj, poŝtoŝtancoj) kie laboras persono kiu parolas Esperanton. Tiun liston ili havebligis laŭpete al Esperantistoj kiuj vojaĝos eksterlande. Ĉu vi posedas informojn utilajn al ili? Se jes, skribu al Monda Turismo, P. K. 45, Sofia, Bulgario.

Internacia turismo estas granda komerco en kiu Esperanto povus ludi gravan rolon, sed nur pere de la kunlaboro de ĉiulandaj Esp-istoj!

### TEJO alvokas vin

TEJO serioze studas problemojn de lingva diskriminacio. Se vi havas ideojn aŭ informojn tiurilatajn, aŭ se vi scias pri artikolo aŭ libro kiun vi opinias menciinda al ili, bonvolu skribi al TEJO, Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

### Volas korespondi

24-jara instruistino de la franca lingvo. Amas klasikan muzikon, precipe de Beethoven kaj Mozart. Entuziasma pri la granda ideo Zamenhofs, volas plifluigi sian lingvon.

F-ino I Gjong-e  
#10 2-Ga Kuandong  
Inĉon Gjong-gi-do  
Koreio  
poŝtnumero 160

19-jara studento. Deziras samaĝan usonan korespondanton.

S-ro Juan Ramón Amunategui  
Bolonia No. 2  
Madrid 28  
Hispanujo

### Ni gratulas

s-ron Donald Broadribb, kiun la Akademio de Esperanto ĉi-jare elektis kiel anon. S-ro Broadribb redaktis Nordamerikan Esperanto-Revuon, la organon de ELNA, de 1960 ĝis 1964.

### Pacifika kaj "universala" movadoj

El 59 Universalaj Kongresoj (se oni enkalkulas la du okazontajn en Beograd kaj Hamburg) nur kvar okazis ekster Eŭropo, el kiuj tri en Usono kaj nur unu en Azio. Ne taŭgus ĉi tie ĉikani pri ebla respektomanko de UEA al la ekstereŭropa movado (oni ekzemple havu la takton ne memori, ke nur unu estrarano de UEA degnis ĉeesti la 57an en Portland), sed ĉu starigo de forta pacifika movado ne povus iomete plibonigi la situacion? Rigardu la leteron ĉi-kontraŭan!

LA 60-A KONGRESO DE JAPANAJ ESPERANTISTOJ  
11-13 AŬGUSTO 1973, KAMEOKA

La 17-an de majo 1973

S-ro Francis E. Helmuth  
5526 Beaumont Avenue  
La Jolla, Calif. 92037  
USONO

Re: Oficiala Invito

Estimata Samideano;

Ni havas la grandan ĝojon inviti vin al la 60-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, kiu lokon havos en

Kameoka (Kioto), (en la Urba Publika Halo)  
de la 11-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1973.

Kvankam nacia, ĉi tiu Kongreso havos tre internacian etoson dank' al multaj partoprenontoj el diversaj landoj, des pli, se vi povos ĝin honori per via propra aliĝo kaj per sendo de reprezentantoj de via organizo.

Ni esperas ke ni povos okazigi jam en la 10-a aŭgusto speciale Internacian renkontiĝon, kiel antaŭkongreson, por pridiskuti diversajn problemojn inkluzive de la okazigo de Pacifika Kongreso de Esperantistoj, kies neceson oni sincere priparolas.


Kiel vi scias, Kioto estas tre malnova ĉefurbo de Japanujo kie multaj kulturaj valoraĵoj estas konservataj kaj Kameoka estas ĝia sub-urbo en distanco de duonhora veturado. Idilia urbeto, ĉirkaŭita de verdaj montaroj kaj kamparoj, ĝi certe donos ĝuindan restadon al ĉiuj kongresanoj. Precipe al la gesamideanoj eksterlandaj la urbestro de Kameoka montros apartan bonvenigan servon. Bonvolu noti, ke vi estos urba honora gasto kun privilegio de senpaga loĝado dum la Kongreso.

Ni mencias ankaŭ ke ĉi tie en Kameoka estas la centro de Oomoto-movado, kiu festos ĉi-jare la kvindek-jaran jubileon de enkonduko de Esperanto kaj pretas meti sian vastan teritorion kun ĝardenoj, loĝejoj kaj manĝejoj je la dispono de la Kongreso.

Ni deziras ke la 60-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj estu epokfara evento malfermi brilajn perspektivojn de nia movado kaj ni certas ke tiurilate via partopreno multe kontribuos por la sukcesigo de la Kongreso. Samtempe ni petas ke vi diskonigu la supran informon al la membraro de via organizo.

Kun koraj bondeziroj, ni salutas vin,

sincere via,



Eizo Ito  
Prezidanto

Organiza Komitato de la 60-a Kongreso  
de Japanaj Esperantistoj

Ten'onkjo, Kameoka, Kioto-hu  
621 Japanujo

La bopatro de L. Zamenhof

--Adolf Holzhaus

L. Zamenhof en 1885 finis sian kreadon de l' internacia lingvo Esperanto kaj dum du jaroj serĉis eldoniston. Neniu volis aŭdi pri Esperanto, ĉar jam ekzistis la lingvo Volapük. Neniu volis riski eĉ malgrandan sumeton da mono por eldoni la unuajn malgrandajn broŝuretojn pri Esperanto en rusa, pola, franca, germana kaj angla lingvoj. Tio ĉi estis farita dank' al la helpo de A. Zilbernik, patro de Klara Zilbernik, edzino de L. Zamenhof. Li dum dek kvin jaroj donis monon necesan por propagandado de la lingvo kaj por vivteno de Zamenhof, ĉar la profesiaj enspezoj de ĉi tiu estis tiel malgrandaj, ke ili kovradis nur parton de liaj plej modestaj elspezoj. Tiun monhelpon faris A. Zilbernik, kiu kredis je la ideo de sia bofilo. Li subtenadis lin ne nur materiale, sed ankaŭ morale: tuj post la apero de Esperanto (1887.07.26), li ellernis ĝin perfekte, malgraŭ sia granda aĝo. Li ĉiam konsolis sian bofilon, kiam la espero de tiu ĉi lasta komencis malfortiĝi. Li havis ĉiam grandan amon kaj intereson por la afero Esperanta, kaj la lastaj libroj kaj gazetoj, kiuj troviĝis sur la skribotablo antaŭ lia morto, estis Esperantaj.

En Kovno, Rusujo, en kompanio kun alia persono, Zilbernik posedis malgrandan fabrikon de sapo, en kiu li laboris ĝis la 74-a jaro de sia vivo. Li havis naŭ gefilojn. Li mortis post kelkaj monatoj da suferado en la loĝejo de unu el siaj filinoj (Levite), la 25-an de Marto 1906.

Al A. Zilbernik, unua mecenato de Esperanto, ni esperantistoj multe--tre multe--ŝuldas: ke Esperanto aperis en la mondo, ke ĝi povis transpaŝi la plej malfacilajn unuajn jarojn de sia ekzisto.

Eterna ama memoro restu por lia nomo!

Pri Bahaismo

--Roan Orloff Stone

Kiam Bahá'u'lláh, la Fondinto de la Bahaa Kredo, deklaris en 1863, ke estas tempo por plenumi la antaŭdiron de la profeto Cefanja rilate al la "pura lingvo", Ludoviko Zamenhof havis kvar jarojn.

Kiam Bahá'u'lláh, en Sia lasta granda verko, Epistle to the Son of the Wolf, skribis, en 1891, "Nuntempe nova lingvo kaj nova skribo estas elpensitaj. Se vi deziras, Ni malkaŝos ilin al vi," Esperanto havis kvar jarojn.

La Misio de Bahá'u'lláh estas unueco en ĉiuj fazoj de la vivo. Pro tio, lingvo-interkompreno ankaŭ inkluziviĝas. Ĉar aliloke Li skribis, "La unua paŝo al mondopaco estas reciproka kompreno de lingvo kaj skribo."

Kompreneble, nura lingvounueco ne kondukos al mondopaco. Devas esti aliaj unuecoj ankaŭ, ekzemple, inter religioj, inter gentoj, inter registaroj. Aliaj ordonoj de Bahá'u'lláh estas justeco en ĉiuj niveloj de la vivo; edukado por ĉiuj; spirita solvo de la ekonomia problemoj; egalaj rajtoj por gevoj; ktp. Estas loko por ĉiu Bahaano servi en la Bahaa Kredo, laŭ sia talento, tiamaniere provante antaŭenigi la mondunuecon.

Bahá'u'lláh diris, ke ĉiu vivproblemo havas sian spiritan solvon. Solvo senspirita ne estas solvo, ĉar la problemoj ankoraŭ restas; fakte, ĝi pli malboniĝas! Bahá'u'lláh estas la Dia Kuracisto, kaj li alportas medikamentojn por resanigi la malsanan mondon. Liaj medikamentoj ne estas similaj al tiuj de la antaŭaj Diaj Kuracistoj. Rigardu denove la paŝojn al mondunueco kaj mondopaco; en kiuj antaŭaj Sanktaj Libroj ili troviĝas?

La spirita agado similas al tiu de fermentilo en pano--ĝi estas malgranda, tamen potenca. Ni Bahaanoj en Esperantujo provas dividi kun ĉiuj gesamideanoj la fermentilon, la spiritan potencon, kiu sola sukcesos alporti la mondopacon kaj la mondunuecon.



L' arto de la verkado estas l' arto de la elektado de la precize ĝusta vorto kaj inkluzivas la elekteblon pri la ŝanĝo de tio, kion oni "diras" se la precizan vorton ĝustan ("ĝusta" signifas ne nur, ke ĝi ĝustas en si mem, sed en ĉiaj siaj nuancoj kaj interligoj kun apudvortoj) oni ne povas trovi por ĝin esprimi. L' arto de la tradukarto estas l' arto elekti inter aro da eblaj kompromisoj; ĝi ne permesas tiun gravan elekton. Sed neniam sekuras moduli sian autoron en alian tonon, precipe en pli altan; lin igi ŝajni pli bona ol li volis esti estas unuapaze ekiri la vojon de la propra fuŝfaro stultaspektiga.

En la plimulto de tradukoj literaturaj la granda malfacilaĵo plejofte sin montras pri la provizo de kulturaj ekvivalentoj por aĵoj aŭ sociaj situacioj, kiuj ne ekzistas aŭ, eĉ pli malbone, malsamas pli-malpli en la du socioj eĉ se same nomitaj.

Ĉar lingvo, kompreneble, ne ekzistas en vakuo, sed, male, reprezentas per vortoj la aktivajojn, vivstilojn kaj perceptojn pri la universo de la popolo, kiu ĝin parolas. Fakte, estas lingvistoj, kiuj asertas, ke la pensprocedoj muldiĝas limige per la speco de lingvo, kiun oni ensorbas kun la patrinlakto. Benjamin Lee Whorf donas raporton fascinantan pri la treege malsimila tempopercepto de la Hopi, rivelita per la Hopia verbostrukturo, kompare kun tiu de nia Hindeŭropa verbsistemo de -is/-as/-os. Laŭ li, oni ne povas trovi ekzaktan komparon, aŭ ofte eĉ ian ajn ekvivalenton por ĉi du vaste variantaj konceptoj pri la tempo mem!

Nu, tre malmultaj el ni devas barakti kontraŭ la verbo Hopia, sed la plimulto el ni manĝas pie. Nur klopedu ĝin traduki en iun ajn lingvon. Eĉ la angla-angla pie ne ekvivalentas por la usona pie, vi trovos. Tiam venas la 149 variaĵoj pri la vorto "kamelo" en la araba, la pli ol 160 esprimoj por "ĉevalo" en la mongola, kaj la eskimaj "neĝo" kaj "glacio" larmigus la okulojn de fortika tradukanto. Ĉiuj, kompreneble, nur precizaj subdividoj, kiujn nia kulturo trovas superflujaj, sed la iliaj baze necesaj por la vivstilo.

Iam ĉi skribaĉanto entreprenis polemikon sufiĉe akran kontraŭ du francoj, kiuj asertis, ke la angla ne entenas ekvivalenton por la Esp-a/franca verbo "konstati" spite mian certigon al ili, ke la angla ja disponas almenaŭ du ekvivalentojn. Montriĝis finfine, ke ni ambaŭ pravis, pro tio, ke ili pritraktis la verbformon mem; mi la signifon.

Se vi trovas ĉi elfluojn malpli ol enuigaj, eble mi vin ĉi tie regalos per pli el la samaj kun ekzemploj por via delico--aŭ frustracio. Aŭ, eble, vi trovos la skandalojn kaj originalulojn de Esp-o pli plaĉaj. Nur laŭtigu la voĉojn (ĉe Box 545, Reseda, CA 91335), ĉar mi celas vian plezurigon--ĝis grado prudenta.

El letero al la redakcio

--Charles F. Post

Antaŭlonge mi sentis gravan mankon en nia literaturo. Mia korespondanto vidis "Gunsmoke" je televido kaj demandis, ĉu ekzistas tiaj rakontoj en Esperanto. Nu, mi serĉis, sed kompreneble trovis nenion, sed mi trovis romanon indan je traduko. Do mi tradukis (eble iom fuŝtradukis laŭ normoj de niaj lingvaj spertuloj) la romanon California Passage de Cliff Farrell. Mi sendas ĝin po unu ĉapitro al kelkaj korespondantoj kaj ŝajne ili taksas ĝin inda de la peno. Nun mi jam tradukis la tutan libron kaj sendis ĉion krom la finaj kvar ĉapitroj al amikoj. Kial, mi demandas, oni ne eldonas tiajn librojn en Esperanto? Kompreneble mi ne estas lerta tradukisto, sed eĉ mia mallerta traduko trovas avidajn legantojn inter la ordinaraĵoj esperantistoj. Oni eldonas multajn librojn por la superredukitaj homoj-- kial ne ankaŭ por ni kompatindaj plebuloj?

Pri nia organo

En la venonta numero de ĉi tiu Bulteno evidentiĝos nova ŝanĝo de formato. Richard Thorsten Sandberg, sub kies redaktado ELNA Newsletter tiel okulfrape plibeligiĝis, konsentis komposti kaj dissendi ankaŭ ĉi tiun organon. Sola malavantaĝo de tiu aranĝo estas, ke la kvanto da materialo devos iom ŝrumpi por ĉiu numero--sed kompanse, la redaktoro verŝajne sukcesos pliakuratiĝi la aperon. Ankaŭ eblas, ke tiu metodo ebligis eviti tian amasperdon de supersignoj kiel okazis en la lasta numero (kaj kiu espereble ne videblas en ĉi tiu!).

Kompreneble ne eblas aperigi multe da "literaturo" en la nova Bulteno. Tial alvenis alia ideo pri nia landa organo, t. e., ĉu ni vere bezonas E-lingvan bultenon? Por novaĵoj taŭgas ELNA Newsletter (eventualajn internajn aferojn oni povus tien meti sur aparta folio en Esp-o). Sed la usona gesamideanaro verŝajne deziras ian eblecon montri kolektive sian talenton. Do jen propono: por novaĵoj estu ELNA Newsletter--por literaturo ia ĉiujara kajero, bele presita, kiu povos aperigi ankaŭ pli longajn verkojn. Ĉu tiel ni agu en 1974? Skribu!

Someraĵ kurso en San-Francisko

De la 9a ĝis la 27a de julio okazos la nun kutimaj Esperanto-kursoj ĉe San Francisco State University, kiujn instruos magistro William Auld. Estos komencgrada kaj progresiga kursoj, kaj precipe tiu lasta aspektas nerezisteble alloga. Diskuttemoj estos stilproblemoj (dialektoj, slango, obsceno ktp.), Ŝekspiraj dramoj, la rolo de Kalocsay, la avangarda poemo Kvin Elementoj de Edwin de Kock kaj la Esperanta ideologio! Petu informojn de Esperanto Information Center, P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010.

ELNA-Bulteno  
1014 Weymouth Avenue  
San Pedro, CA 90732  
U. S. A./Usono

BULK RATE  
U. S. POSTAGE  
PAID  
GLENDALE, CALIF.  
PERMIT #575

*Nepre atentu  
la balotilon  
sur paĝo 2!*

RETURN POSTAGE GUARANTEED--  
ADDRESS CORRECTION REQUESTED